

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Supre tronas sur la monto
La kapelo en kviet'.
En la valherbej' ĉe l' fonto
Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo
Ektimigas mortkantad'.
Finas tuj la ĝojjubilo
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto
Supren en la tombojn venos
Paŝtoknabo, laŭ la sorto,
jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poemo
"Die Kapelle" de LUDWIG UH-
LAND (*1787.04.26 - †1862-13-
11) en Esperanton de HANS-
GEORG KAISER (Cezar, *1954-
05-21).*

Arg-639-1290 (2012-11-02
09:10:10)

*Tiu ĉi poem-traduko tro-
viĝas en [http://www.
cezarpoemtradukoj.
cezarpoezio.de/213.html](http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html).*

Ludwig Uhland,
La kapelo

*tradukita de Ludwig Lazarus Za-
menhof*

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonas tra l' silento, -
Haltas knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos.

*Traduko de la Germana poemo
"Die Kapelle" de LUDWIG UH-
LAND (*1787.04.26 - †1862-13-11)
en Esperanton de LUDWIG LAZA-
RUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro
Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-
04-14).*

Arg-639-1288 (2012-11-02
16:27:28)

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ
en [www.literaturo.dk/kapelo.
htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de la listo [http://www.
literaturo.dk/enhavo.htm](http://www.literaturo.dk/enhavo.htm).*

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Manfred Retzlaff

Supre staras la kapelo
Sur la pinto de la mont',
La paŝtist' en suna helo
Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto
De funebro sonas de
La altaĵ' tra la kvieto,
La paŝtist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni
La gajuloj post viv-fin'.
Ho, paŝtisto, iam oni
Portos supren ankaŭ vin.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Die Kapelle" de LUD-
WIG UHLAND (*1787.04.26 -
†1862-13-11) en Esperanton de
MANFRED RETZLAFF (*1938-
11-04).*

Arg-639-1287 (2012-11-02
08:49:45)

*Pri la aŭtoro vidu an-
kaŭ la vikipedian retejon
[http://en.wikipedia.org/
wiki/Ludwig_Uhland](http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).*